



# LA FERA LUPO

Redakcia retadreso: [ds@esperanto.lt](mailto:ds@esperanto.lt); [chtsok@hanmail.net](mailto:chtsok@hanmail.net)  
<http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=jk>

ĈIUTAGA INFORMILO DE TUTMONDA KONGRESO DE ESPERANTISTOJ-JURNALISTOJ N-RO 1 | 2008 05 27, mardo

## KONGRESA TEMO

*Pro teknika malatento en la Kongresa Libro malaperis la lasta parto de la teksto de Humphrey TONKIN (paĝoj 28-30), kiu enhavas la sep demandojn por komenci la diskuton. La organiza komitato pardonpetas vin ĉiujn kongresanojn pro la eraro kaj aliaj preseraroj en la Kongresa Libro.*

### Jen la sep demandoj:

1. Kiel levi la voĉon de la esperantistoj en la ĵurnalisa mondo ekster la Esperanto-movado – ne por disvastigi la lingvon (kvankam tio estus bona flankoprodukto) sed por riĉigi tiun mondon per la unikaj vidpunktoj de esperantistaj observantoj de la monda scenejo?
2. Kiel ligi la presan ĵurnalismon kun la reta? La sukceso de la reta gazeto Libera Folio montris por ni vojon – sed aliaj klopodoj, eble ĉar ili estis tro ambiciaj (*Ĝangalo*) aŭ ĉar mankis al ili kapablo enpenetri la konscion de la esperantistoj (*El Popola Ĉinio*) ne ĝuis saman sukceson. Novan atentindan vojon sekvas *La Ondo de Esperanto* per siaj retaj elsendoj. Pluraj gazetoj, salutinde, nun uzas la reton kiel arkivejon.
3. Kiel starigi kunlaboron inter gazetoj, ekzemple rilate al vendado de abonoj kaj unuopaj ekzempleroj, eltrovo de reklamantoj, k.s? Kaj ankaŭ inter radio kaj la gazetaro?
4. Kiel plifortigi la libromerkaton en Esperanto, per novaj vendaj metodoj, novaj produktometodoj, kaj reciproka interago inter gazeta kaj libra eldonado? Se entute la libra kulturo de Esperanto gravas (kaj mi ja opinias, ke ĝi estas esenca), kion la ĵurnalistoj povas fari por plifortigi ĝin?
5. Kiel regi kaj ekspluati la evoluon de la reto ĝenerale – la ekesto de blogoj diverskvalitaj, abunda amatora reta radio, interagaj retpaĝaroj, podkasto, k.s?
6. Kiel trovi novajn fontojn de enspezoj por nutri nian laboron?
7. Kiel utiligi niajn rimedojn por kultivi nian lingvon, altigi la kvaliton de la parolata kaj skribata Esperanto, etendi ĝin en la fakojn, kaj krei novajn uzantojn de la lingvo?

## IOM PRI LA FERA LUPO

Laŭ la legendo, fiksita en la kroniko de Litovio, Vilnius estis fondita fare de Litovia grandduko Gediminas, kiu Regis la landon ĉirkaŭ sepdek jaroj post Mindaugas kaj titolis sin kiel “reĝo de litovoj kaj multaj rusoj”. Li venis ĉi tien el Trakai por ĉasado, mortigis grandan urson kaj ekdormis en la valo Ŝventaragis, proksime de nuna Kastela Monto. En la sonĝo li ekvidis feran lupon, kiu hurlis kvazaŭ ĝi estus cent lupoj. Aŭguran sonĝon klarigis pagana idolpastro Lizdeika. Li diris al Gediminas, ke sur tiu ĉi loko necesas konstrui kastelon kaj fondi urbon, kiu estos nevenkebla kiel fera lupo; centlupa hurlo signifis famon de tiu urbo, kiu atingos ĉiujn landojn de la mondo. Gediminas obeis klarigojn de la idolpastro kaj nomon por la nova urbo – sia estonta ĉefurbo – li prenis de apuda rivero Vilnia. — *el la libro “Vilnius” de Tomas Venclova.*

La urbo Vilnius do estas legende ligita al fera lupo. De tio venas la nomo de la kongresa gazeto. Ni ĉiuj kunlaboru, por ke “La Fera Lupo” nia estu vaste legenda. Pro la fera lupo la duko Gediminas fondis la belan ĉefurbon. Pro “La Fera Lupo” prosperu la Esperanto-gazetaro.

### Grandduko Gediminas, fondinto de Vilnius





## FOTORAPORTO DE LA TUTTAGA EKSKURSO



Trakai kastelo

Lunde, en la unua kongresa tago okazis la tuttaga ekskurso. Ĉirkaŭ 60 kongresanoj partoprenis en la ekskurso. Kompare kun nubaj kaj pluvaj tagoj de la pasinta semajno, la vetero vere gratulis nian ekskurson per sunbrilo. Laŭ veterprognozo ĝi favoros nin dum la tuta kongreso.

Jen estas ekskursaj fotoj, kiujn faris *Sang Sup JUNG* el Koreio.



**KN** Ni aspektas gastoj de la litovia ŝtatestro.



**Gediminas DEGĖSYS** entuziasme ĉiĉeronis. Ho, tiom da esperantistoj! Eĉ la ĉefa turisma strato estas ŝtopita.



"Litvo, patrujo mia!" ĉe Adam Mickiewicz

Komuna fotiĝo ĉe la katedralo



## Gazetara konferenco



Lunde, je la 11a horo deko da litoviaj ĵurnalistoj ĉeestis la gazetaran konferencon de nia kongreso, kiun prezentis *Povilas Jegorovas, Dainius Radzevičius, Audrys Antanaitis, Humphrey Tonkin kaj Barbara Pietrzak.*

Litova ĵurnalistino levis demandon: “Ĉu Esperanto populariĝas?” Tio estas ja unu el la kutimaj demandoj. Tonkin respondis jene: “Lastatempe la ideo de Esperanto kaptis atentojn de junuloj danke al la interreto, kaj tio donis al Esperanto novan vivon. Tajpu “Esperanto”-n en la *Google* serĉilo, kaj vi certigos pri la nuna populareco de Esperanto.”

Kelkajn tagojn antaŭe Jegorovas dissendis informtekston pri la kongreso al la litova gazetararo.

## IpI kaj Intl:

### Du instrumentoj de priscienca informado

Prelego okazos hodiaŭ je 16h35-17h05

Mi redaktas du instrumentojn por scienca priesperanta informado.

(1) Unu estas internen direktata, do redaktata por (inter)lingvistike interesataj esperantlingvuloj.

La “Informilo por Interlingvistoj” (IpI), la sola eldonaĵo siaspeca, eldonata de “Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj” (CED), enhavas informojn pri novaj interlingvistikaj/esperantologiaj kaj lingvo-politikaj eldonaĵoj, publikigas bibliografiojn (diverstemajn kaj personajn), recenzojn kaj informojn pri gravaj fakuloj, fakaj eventoj pasintaj aŭ planataj. La informilo celas teni informitaj tiujn homojn, kiuj sciencnivele volas agadi en esperantlingvaj kaj nacilingvaj (inter)lingvistikaj medioj kaj sekve bezonas adekvatan preparitecon. IpI aperadas ekde 1992, do komence de 2008 en sia 17-a jaro. Ĝis la ĵurnalista kongreso aperis entute 65 numeroj kun sume 1184 paĝoj. La bulteno por fakuloj estas enpage ricevebla de la Centra Oficejo de UEA.

(2) La alia informilo estas eksteren direktita. En tiu kazo la celgrupo estas germanlingvuloj, do unuavice profesiaj lingvistoj, sed ankaŭ bibliotekoj kaj diversaj sciencaj institucioj.

La bulteno “Interlinguistische Informationen” (Intl) estas la organo de la germana scienca “Societo pri Interlingvistiko” (Gesellschaft für Interlinguistik e.V.). Intl havas je ĉirkaŭ 70% similan enhavon kiel IpI. Ankaŭ ĝi aperadas jam en la 17-jaro. Kune kun sia lasta kajero (66-67) ĝi kovras similan paĝo-kvanton kiel IpI, do ĉirkaŭ 1200 paĝoj.

Detlev Blanke (dblanke.gil@snaflu.de)

## Gratulas la Kongreson

Nome de KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-Movado de UEA) mi kore gratulas vian unuan kongreson de esperantistoj-ĵurnalistoj. Mi rimarkas, ke la programeroj estas tre riĉaj kaj fakaj.

Danke al via eminenta iniciato, nia movado pli kaj pli maturiĝos kaj progresos.

Esperante sukcesan kongreson,

**Sincere via, LEE Jung-kee (Prez. de KAEM)**

Saluton al LEA/TEĴA!

Mi skribas el Meksiko. Mi gratulas al la Litova Esperanto-Asocio pro proksima okazaĵo je la Tutmonda Kongreso de Esperantistoj-Ĵurnalistoj.

Plej bondezirojn mi sendas por tiu ĉi okazo. Mi ĵus eksciis pri la Kongreso. Domaĝo! Tamen, mi deziras aliĝi al TEĴA, do mi estas meksikana ĵurnalisto.

Bonan sukceson!

Ĝis baldaŭ.

**Guillermo Macias, Aguascaliento, Meksiko**

Mi ege bedaŭras, sed pro kialoj personaj mi devas resti en Rumanio ĝis la 1a de junio. Tial mi ne povas partopreni la Kongreson.

Egajn pardonpetojn!

Amike,

**Ladislao SZOKE - nun el Rumanio**


Floroj de Vilnius bonvenigas vin, ĉiujn kongresanojn.



## Kiel atingi la Malnovan Urbodomon en la Didžioji strato 31

La hodiaŭa kaj morgaŭa kongresaj laboroj okazas en la Malnova Urbodomo, kiu situas en la centro de la malnova urbo. De la hotel *Ecotel* ĝi estas plej facile atingebla per piede.

Vi povas sekvi la nigran linion sur la apuda mapo. Vi povas veturi ankaŭ per la buso n-ro 33, tamen ĝi veturas kun granda tempointervalo. Enbusiĝu en la *Rinktinės* haltejo kaj elbusiĝu en la *Užupio* haltejo. La bushoraro: ... 06h57, 07h53, 08h34, 09h24, 10h22, 11h30, 12h22 ...



La trafika mapo de la urbocentro

## Bileto por publika transporto



Unufoja bileto kostas unu lidon kaj 10 cendojn kaj aĉeteblas ĉe kiosko. Oni povas aĉeti ĝin ankaŭ ĉe ŝoforo kontraŭ unu lido kaj 40 cendoj. Bileto estas sama por buso kaj trolebuso.

**NE FORGESU tuj validigi ĝin**, enbusiĝinte. Krome, veturo estas malpli kosta per vokita takso el hotelo ol per surstrate prenita takso.

## Komparo de lidoj kaj eŭroj

Lidoj	Eŭroj	Lidoj	Eŭroj	Lidoj	Eŭroj
0,10 =	0,03	2 =	0,58	10 =	2,90
0,20 =	0,06	3 =	0,87	20 =	5,80
0,50 =	0,14	4 =	1,16	50 =	14,49
<b>1 =</b>	<b>0,29</b>	5 =	1,45	<b>100 =</b>	<b>28,99</b>

## Gravaj litovaj vortoj kaj frazoj

- Saluton - Sveiki [svejki']
- Bonan matenon - Labas rytas [la'bas ri'tas]
- Bonan tagon - Laba diena [laba' djena']
- Bonan vesperon - Labas vakaras [la'bas va'karas]
- Dankon - Ačiū [a'ĉju]; dĉkui [de'kuj]
- Multan dankon - Ačiū labai [a'ĉju labai']
- Ne dankinde - Nĉr uŝ ka [ner uŝ ka']
- Mi petas - Praŝau [praŝau']
- Bonvolu - Praŝom [pra'ŝom]
- Mi dankas - Dĉkoju [deko'ju]
- Mi pardonpetas - Atsipraŝau [atsipraŝau']
- Pardonu - Atleiskite [atlejs'kite]
- Ĉion bonan - Viso labo [vi'so la'bo]
- Ĝis revido - Iki pasimatymo [iki' pasima'timo]
- Adiaŭ - Sudie [sudje']
- Jes - Taip [tajp]
- Ne - Ne [ne]
- Bone - Gerai [geraj']
- Tre - Labai [labaj']
- Malbone - Blogai [blogaj']
- Mi volas - Aŝ noriu [aŝ no'rju]
- Mi ŝatas - Aŝ mĉgstu [aŝ meg'stu]
- Mi ne komprenas - Aŝ nesuprantu [aŝ nesuprantu']
- Kafo - Kava [kava']
- Teo - Arbata [arbata']
- Biero - Alus [alus']
- Kafejo - Kavine [kavi'ne]
- Trinkejo - Baras [ba'ras]
- Restoracio - Restoranas [restora'nas]
- Kiom kosta - Kiek kainuoja [kjek kajnuo'ja]

## El la redakcio

La redakcio kolektas viajn kontribuojn per retadresoj: [ds@esperanto.lt](mailto:ds@esperanto.lt); [chtaesok@hanmail.net](mailto:chtaesok@hanmail.net) aŭ pere de organizantoj aŭ persone. Lia ĉambro numero de *Ecotel* estas 233; lia poŝtelefono: +370 6861 3453. La redaktoro klopodos esti surloke dum kongresaj laboroj. Ĉi tiun numeron redaktis *CHOE Taesok, Vida ĈOJIENĖ, Sang Sup JUNG*.

Viaj raportoj, anoncoj kaj similaj por la venonta numero estu transdonitaj al la redakcio plej malfrue je la 14a horo de la kuranta tago.

Anticipan dankon pro via kunlaboro.